# KROPOTKIN

## revolucia registaro aŭ anarkio ?

★

## Anarkista agado en la revolucio

★

Suplemento
de
La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut
111 B 1976 1,50 FF

# KROPOTKIN

Enhavo


- Revolucia registaro ... 3
- Anarkista agado en la revolucio ... 17
- Deklaro de la anarkistoj ... 37
- La anarkio : ĝia filozofio, ĝia idealo (ekstraktoj) ... 38



La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

Broŝura serio de LJP.
adreso: La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut, Francio.
poŝtkonto: La Juna Penso, 3 374 04 M, Bordeaux.

Mendoj: ĉiu ajn povas mendi laŭ la ĉi-suba listo. La prezoj inkludas la afrankon. Oni povas mencii nur la titolmajusklojn.
Abonoj: Ĝiri minimume 10FF. Tiel oni ricevos ĉiujn noveldonaĵojn ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo k ĝuos 20% da rabato.

| | Kelkaj el la disponeblaj broŝuroj | FF |
|---|---|---|
| IE. | Initiation à l'espéranto (An Kaù) por francoj | 1,50 |
| LE. | La laborista esperantismo (E. Lanti) | 1,25 |
| NR. | Ĉu neperforta revolucio aŭ liberiga milito?(Ebert) | 1.25 |
| GL. | Granda liberiĝo de l'homoj per scienco (Duboin) | 1,25 |
| EF. | Espéranto en 24 pages (por franclingvanoj) | 1. |
| PE. | Pri edukado (E. Lanti) | 1,50 |
| EV. | Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti) | 1,50 |
| MS. | Memvola servuto (La Boesi) | 1,50 |
| RR. | Du rêve à la réalité : l'espéranto (H. Masson) | 1,50 |
| EL. | El leteroj de E. Lanti | 1,50 |
| PP. | Por la paco, kontraŭ la milito (citaĵoj) | 1,25 |
| EH. | Esperanto en 24 páginas (por hispanlingvanoj) | 1. |
| NP. | Nekombitaj pensoj (S.J.Lec) | 1,25 |
| RS. | Rido sanigas! (poemaro de Josef Burger) | 1,50 |
| LP. | La liberecana penso (citaĵoj) | 1,25 |
| AO. | Anarkio kaj organizo (Malatesta) | 1,25 |
| AB. | Absolutismo (prelego de E. Lanti) | 1. |
| NM. | Ne mortigu! (Leo Tolstoj) | 0,50 |
| PI. | La rajto de pigro (Paŭlo Lafargue) | 1,50 |
| HP. | La humanitaristaj principoj (Eŭgeno Relgis) | 1,25 |
| PC. | La parabolo pri la cisterno (E. Bellamy) | 0,75 |
| DU. | Durruti, simbolo de la hispana milito (Pario) | 1,25 |
| PT. | La piramido de l'tiranismo (F.Domela Nieuwenhuis) | 1,50 |
| PO. | Paco en proksima oriento (Aharon Cohen) | 1,25 |
| CM. | Civila Malobeemo (H.D.Thoreau) | 1,25 |
| AC. | Atomcentraloj (debato enkondukita de R.Levreaud) | 1,25 |
| TM. | Tra la mondo per biciklo kaj esperanto (Alfa-Beta) | 1,50 |
| HM. | Historia materiismo - Ĝeneralaj konsideroj pri la problemo de organizado (Anton Pannekoek) | 1,25 |
| KE. | La Kvina Evangelio (Han Riner) | 6. |
| HH. | Herezulo - Herezaĵo (E. Lanti) | 1,50 |
| MV. | Mia vivo - Dek artikoloj (N. Bartelmes) | 2,50 |
| IM. | Individuista Manlibreto (Han Riner) | 1,50 |
| LV. | Liberecanaj vivkonceptoj (Fontaura) | 1,25 |
| NA. | Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg) | 1,50 |

El "Paroloj de ribelanto" (1885):

# Revolucia registaro

Ke ĉiuj nuntempaj registaroj devas esti abolitaj, por ke libero, egalo kaj frateco ne plu estu vanaj vortoj sed fariĝu vivantaj realaĵoj; ke ĉiuj ĝis nun provitaj formoj de registaro estis nur samtiom da subpremformoj kaj devas esti anstataŭitaj de alia formo de grupiĝo; pri tio perfekte akordas ĉiuj, kiuj havas minimume revolucieman cerbon kaj temperamenton. Verdire, ne necesas esti tre novigema por tion konkludi; la mankoj de la nuntempaj registaroj kaj la neeblo reformi ilin estas tro evidentaj, por ne okulfrapi ĉiun prudentan observanton. Kaj oni ĝenerale scias, ke en iuj epokoj renverso de registaroj okazas sen multe da malfacilaĵoj. Estas momentoj, kiam la registaroj disfalas preskaŭ per si mem, kiel kasteloj el ludkartoj, sub la blovado de l'ribelanta popolo. Tion oni ja vidis en 1848 kaj en 1870; tion oni baldaŭ vidos.

Renversi registaron estas la tuta programo por burĝa revoluciulo. Por ni, tio estas nur komenco de la socia revolucio. Kiam la ŝtataparato estas difektita, la hierarkio de l'funkciuloj malorganizita kaj ne plu scianta kiel funkcii, kiam la soldatoj ne plu fidas siajn estrojn, unuvorte, kiam la armeo de la defendantoj de l'kapitalo estas disvenkita, tiam stariĝas antaŭ ni la granda tasko detrui la instituciojn, kiuj servas por ĉiamigi la ekonomian kaj politikan sklavecon. La ebleco libere agi estas akirita, kion tuj faros la revoluciuloj ?

Al tiu demando nur la anarkistoj respondas : "Registaron ne, sed anarkion !" Ĉiuj ceteraj diras : "Revolucian registaron !" Ili diferencas inter si nur pri la formo de tiu registaro elektota per la universala voĉdonrajto, en la Ŝtato aŭ en la Komunumo; la aliaj sin esprimas favore al revolucia diktaturo. "Revolucia registaro !" Jen du vortoj, kiuj tre strange sonas ĉe la oreloj de tiuj, kiuj ekkonscias kion devas signifi la socia revolucio kaj kion signifas registaro. Du vortoj, kiuj kontraŭas unu la

alian, detruas unu la alian. Fakte, oni ja vidis despotecajn registarojn, estas la esenco de ĉiu registaro subteni la reakcion kontraŭ la revolucio kaj nepre tendenci al despotismo; sed oni neniam vidis revolucian registaron, memkompreneble. Tial, ĉar la revolucio, sinonimo de "malordigo", de "renverso" en kelkaj tagoj, de multjarcentaj institucioj, de perforta malkonstruado de la establitaj formoj de la proprieto, de detruado de l'kastoj, de rapida transformado de la konvenciaj ideoj pri moralo, aŭ prefere pri la hipokrito, kiu okupas ĝian lokon, de individua libero kaj de spontana agado - estas ĝuste la kontraŭo, la neado de registaro, ĉar tiu ĉi estas sinonimo de "establita ordo", de konservatismo, de konservado de l'ekzistantaj institucioj, neado de l' individuaj iniciatemo kaj agado. Kaj tamen ni senĉese aŭdas pri tiu blanka merlo, kvazaŭ "revolucia registaro" estus la plej simpla afero en la mondo, tiel ordinara kaj tiel konata de ĉiuj, kiel la reĝeco, la imperieco aŭ la papeco !

Ke la t.n. burĝaj revoluciuloj predikas tiun ideon, tio estas komprenebla. Ni scias, kion ili celas per la vorto Revolucio : tutsimple regipsadon de la burĝa respubliko; la kaptadon, far la t.n. respublikanoj, de la profitdonaj oficoj hodiaŭ rezervitaj por la bonapartistoj kaj la rojalistoj; apenaŭ la eksedziĝon inter la Eklezio kaj la Ŝtato, kion anstataŭus la konkubeco inter ambaŭ; la sekestradon de la klerikaraj posedaĵoj profite al la Ŝtato kaj precipe al la estontaj administrantoj de tiuj posedaĵoj; eble ankaŭ la referendumon, aŭ iun alian, samspecan maŝinon. Sed ke socialistaj revoluciuloj fariĝu la apostoloj de tiu ideo, ni povas klarigi, nur farante unu el tiuj du supozoj :
- aŭ tiuj, kiuj akceptas ĝin, estas penetritaj de burĝaj antaŭjuĝoj, kiujn ili nekonscie ĉerpis el la literaturo kaj ĉefe la historio verkitaj por la burĝaro fare de burĝoj, kaj, penetrite ankaŭ de servisteco, produkto de jarcentoj da servuto, ili ne povas eĉ imagi sin liberaj;
- aŭ ili ne volas tiun Revolucion, kies nomon ili ĉiam havas en la buŝo.

Kondiĉe ke oni donu al ili la regpovon, ili kontentiĝus per simpla regipsado de la nuntempaj institucioj, riskante vidi poste, kion necesos fari por trankviligi "la beston", t.e. la popolon. Ili havas venĝemon kontraŭ la momentaj regantoj nur por preni ilian lokon. Kun tiuj ĉi ni ne devas argumenti. Ni celos do nur tiujn, kiuj eraras sincere.

Ni komencu per la unua el la du formoj de "revolucia registaro", kiujn oni rekomendas, la balotelektita registaro.

La reĝa povo aŭ alia estas renversita, la armeo de la defendantoj de l'kapitalo estas disvenkita; ĉie la fermentado, la diskutado pri la publika afero, la deziro antaŭenmarŝi. La novaj ideoj ekaperas, la neceso pri serioza ŝanĝiĝo estas komprenita, necesas agi, necesas komenci senkompate la malkonstrutaskon, por malembarasi la terenon por la nova vivo. Sed kion al ni oni proponas fari ? Kunvoki la popolon por la balotado, por tuj elekti registaron, por konfidi al ĝi la taskon, kiun ni ĉiuj, ĉiu el ni, devus fari propraîniciate.

Tion faris Parizo, post la 18a de marto 1871. "Mi ĉiam memoros - diris al ni amiko - tiujn belajn momentojn de l'liberigo. Mi estis malsuprenirinta el mia alta ĉambro de l'Latina Kvartalo por eniri en tiun vastegan, eksterdoman klubon, kiu plenigis la bulvardojn de unu al alia ekstremaĵo de Parizo. Ĉiuj diskutis pri la publika afero; ĉiu persona maltrankvilo estis forgesita : ne plu temis aĉeti nek vendi; ĉiuj pretis sin ĵeti korpe kaj anime al la estonteco. Eĉ burĝoj, kunprenite de la universala ardo, vidis kun feliĉo malfermiĝi la novan mondon:

"Se necesas fari la socian revolucion, nu! ni metu ĉion en kolektivon; ni estas pretaj !"

La elementoj de la Revolucio estis tie : temis nur ekantaŭenigi ilin. Vespere, revenante en mian ĉambron, mi diris al mi : "Kiel bela estas la homaro! Oni ne konas ĝin, ĉiam oni ĝin kalumniis !"

Poste okazis la balotado, la membroj de la Komuno estis nomitaj, kaj la forto de l'sindonemo, la fervoro por la agado iom post iom estingiĝis. Ĉiu revenis

al sia kutima tasko, dirante al si : "Nun ni havas honestan registaron, ni lasu ĝin agi". Oni scias tion, kio sekvis.

Anstataŭ agi per si mem, anstataŭ marŝi antaŭen, anstataŭ sin ĵeti kuraĝe al nova sociordo, la popolo, fidante sian registaron, fidas ĝin por ekiniciati. Jen la unua konsekvenco, fatala rezultato de l' balotado. Kion do faru tiuj regantoj investitaj de ĉies fido ?

Neniam estis pli libera balotado ol tiu de marto 1871. Eĉ la kontraŭuloj de l'Komuno tion agnoskis. Neniam la granda amaso de l'balotantoj estis pli penetrita de l'deziro doni la regpovon al la plej bonaj homoj, homoj de l'estonteco, revoluciuloj. Kaj tion ĝi faris. Ĉiuj famaj revoluciuloj estis elektitaj per grandegaj plimultoj; Jakobenoj, Blankistoj, Internaciuloj, la tri revoluciaj frakcioj troviĝis reprezentitaj en la Komunuma Konsilantaro. La balotado ne povis liveri pli bonan registaron.

Oni konas la rezultaton. Enfermite en la Urbodomo, kun la tasko procedi laŭ la formoj establitaj de la antaŭaj registaroj, tiuj fervoraj revoluciuloj, tiuj reformantoj troviĝis trafitaj de malkapablo, de sterileco. Kun sia tuta bonvolo kaj sia kuraĝo, ili eĉ ne sciis organizi la defendon de Parizo. Estas vere, ke hodiaŭ oni responsigas pri tio la homojn, la individuojn; sed la kaŭzo de tiu malsukceso estis ne la individuoj sed la aplikita sistemo.

Fakte, la universala voĉdonrajto, kiam libera, povas liveri asembleon apenaŭ reprezentantan la mezon de la opinioj, kiuj cirkulas nun en la popolo; kaj tiu mezo, komence de la revolucio, ĝenerale havas nur malprecizan ideon pri la plenumota tasko, sen konscii pri la uzota agmaniero. Ha! Se la plimulto de l'nacio, de l'Komuno, povus interkonsenti, antaŭ la movado, pri tio farota tuj kiam la registaro estos renversita ! Se tiu revo de l'kabinetaj utopiistoj povus realiĝi, ni eĉ neniam estus havintaj sangajn revoluciojn : ĉar la volo de l'nacia plimulto estus esprimiĝinta, al ĝi la cetero estus bonvole submetiĝinta. Sed ne tiel okazas la aferoj. La revolucio eksplodas multe pli frue

ol povus realiĝi ĝenerala interkonsento, kaj,kiuj havas precizan ideon pri tio farota la morgaŭon de la movado, tiuj estas tiam nur eta malplimulto. La granda plimulto havas ankoraŭ nur ĝeneralan ideon pri la celo, kiun ĝi ŝatus realigita, sen detale scii kiel marŝi al tiu celo, sen multe fidi pri la irota vojo. La praktika solvo troviĝos, preciziĝos, nur kiam la ŝanĝo estos jam komencita : ĝi estos la produkto de la revolucio mem, de la aganta popolo, aŭ ĝi estos nenio, ĉar la cerbo de kelkaj individuoj estas tute nekapabla trovi tiujn solvojn, kiuj povas naskiĝi nur el la popola vivo.

Speguliĝas tiu situacio mem en la balote elektita asembleo, eĉ se ĝi ne havus ĉiujn mankojn propraj al la reprezentaj registaroj ĝenerale. La kelkaj homoj, kiuj reprezentas la tiaman revolucian ideon troviĝas dronigitaj inter la reprezentantoj de la revoluciaj skoloj de l'pasinteco aŭ de la ekzistanta soci-ordo. Tiuj homoj, kiuj estus tiom necesaj meze de l' popolo, kaj ĝuste dum tiuj revoluciaj tagoj, por dissemi siajn ideojn, por ekmovi la amasojn, por detrui la pasintecajn instituciojn, troviĝas tie najlitaj en salonego, diskutaĉante por eltiri koncedojn de l'moderuloj, por konverti malamikojn, dum ekzistas unu-nura rimedo por varbi ilin al la nova ideo, tio estas efektivigi ĝin. La registaro ŝanĝiĝas en parlamenton, kun ĉiuj mankoj de l'burĝaj parlamentoj. Ĝi ne nur ne estas "revolucia" registaro, sed ĝi fariĝas la plej granda obstaklo kontraŭ la revolucio kaj, por ĉesi surloke stagni, la popolo estas devigata forpeli ĝin, eksigi tiujn, kiujn ankoraŭ hieraŭ ĝi aklamis kiel siajn elektitojn. Sed tio ne plu estas tiel facila. La nova registaro, kiu rapidis organizi tutan alian administracian hierarkion por disvastigi sian super-regadon kaj obeigi al si, ne intencas tiel facile cedi la lokon. Ĵaluza pluteni sian regopovon, ĝi kroĉiĝas al ĝi kun la tuta energio de institucio, kiu ankoraŭ ne havis la tempon fali en senilan putradon. Ĝi estas preta kontraŭstarigi perforton kontraŭ perforto; kaj por forigi ĝin estas nur unu rimedo : uzi la armilojn, refari revolucion, por forpeli tiujn, en kiujn oni lokis sian tutan esperon.

Kaj jen dividita la revolucio ! Perdinte valoregan tempon pro prokrastoj, ĝi nun perdas siajn fortojn en internaj disiĝoj inter la amikoj de l'juna registaro kaj tiuj, kiuj komprenis necesa ĝian forpelon ! Kaj ĉio ĉi, tial ke oni ne komprenis, ke nova vivo postulas novajn formojn; ke oni ne faras revolucion, kroĉiĝante al la malnovaj formoj ! Ĉio ĉi, tial ke oni ne komprenis la neakordigeblon inter revolucio kaj registaro, tial ke oni ne ekvidis, ke unu, en kiu ajn formo ĝi prezentiĝas, ĉiam estas la neado de la alia, kaj ke, ekster anarkio, ne estas revolucio.

II.

Same estas por tiu alia formo de "revolucia registaro", kiun oni laŭdas al ni, la revolucia diktaturo.

Tiel evidentaj estas la danĝeroj minacantaj la Revolucion, se ĝi lasas sin mastri fare de elektita registaro, ke tuta skolo da revoluciuloj tute rezignas tiun ideon. Ili komprenas, ke per la balotrimedo ribelanta popolo ne povas havigi al si registaron, kiu ne reprezentus la pasintecon kaj kiu ne estus kuglego ligita al la piedoj de l'popolo, precipe kiam temas plenumi tiun vasteganregeneron ekonomian, politikan kaj moralan, kiun ni komprenas per "socia Revolucio". Ili do rezignas la ideon pri registaro "laŭleĝa" - almenaŭ por la periodo de ribelado kontraŭ la leĝeco - kaj ili rekomendas la "revolucian diktaturon".

"La partio - ili diras - kiu estos renversinta la registaron, perforte substituiĝos al ĝi. Ĝi kaptos la regpovon kaj procedos laŭ revolucia maniero. Ĝi faros la necesajn decidojn por sukcesigi la ribeladon; ĝi detruos la malnovajn instituciojn; ĝi organizos la defendon de l'teritorio. Al tiuj, kiuj ne volos agnoski ĝian aŭtoritatecon, la gilotinon; al tiuj, popolanoj aŭ burĝoj, kiuj rifuzos obei la ordonojn, kiujn ĝi proklamos por reguli la procezon de la revolucio, ankaŭ la gilotinon ! " Jen kiel rezonas la leviĝantaj Robespieroj, tiuj, kiuj memoras el la granda epopeo de la pasinta jarcento nur ĝian malkreskon, tiuj,kiuj lernis nur la paroladojn de la Respublikaj prokuroroj.

Laŭ ni, anarkistoj, la diktaturo de ununura individuo aŭ de partio - fakte tio estas sama afero - estas definitive juĝita. Ni scias, ke socia revolucio ne estas gvidata de la spirito de ununura homo aŭ de grupo. Ni scias, ke revolucio kaj registaro ne estas akordigeblaj : unu devas mortigi la alian, malmulte gravas kiun nomon oni donas al la registaro : diktaturo, reĝeco aŭ parlamento. Ni scias, ke kio faras la forton kaj la veron de nia tendaro, tio troviĝas en ĝia fundamenta formulo : "Fariĝas nenio bona kaj daŭra, krom per la libera iniciativo de l' popolo, kaj ĉiu regpovo emas mortigi ĝin !" Tial la plej bonaj el ni - se iliaj ideoj ne plu pasus tra la fandujo de l'popolo por efektiviĝi, kaj se ili fariĝus mastroj de tiu terura aparato, la registaro, kiu permesus al ili agi laŭvole - tiuj post ok tagoj fariĝus mortigindaj. Ni scias kien kondukas ĉiu diktaturo, eĉ la plej bonintenca : al la morto de l'revolucio. Kaj fine ni scias, ke tiu ideo pri diktaturo ĉiam estas nur malsana produkto de tiu registara fetiĉismo, kiu, kune kun la religia fetiĉismo, ĉiam pluigis la sklavecon.

Sed hodiaŭ ne al la anarkistoj ni vokas. Ni parolas al tiuj, el la registaristaj revoluciuloj, kiuj, trompite pro la antaŭjuĝoj de sia edukado, eraras sincere kaj sincere deziras diskuti. Ni do parolos al ili, adoptante ilian vidpunkton.

Kaj komence jen ĝenerala rimarkigo. Tiuj, kiuj predikas la diktaturon, ĝenerale ne konscias, ke, subtenante tiun antaŭjuĝon, ili preparas la vojon nur al tiuj, kiuj poste tranĉos ilian gorĝon. Tamen ekzistas de Robespiero vorto, kiun liaj admirantoj devus bone memori. Li mem principe ne neis la diktaturon. Sed... "Zorge evitu tion" li abrupte respondis al Mandar, kiam tiu ĉi aludis tion al li, "Brissot estus diktatoro!" Jes, Brissot, la ruza Girondano, obstina defendanto de l'proprieto (kiun iam li nomis ŝtelo), Brissot, kiu estus trankvile enkarceriginta Hébert, Marat kaj ĉiujn jakobenajn moderulojn.

Sed tiu parolo datiĝas de 1792 ! Tiam Francio jam de tri jaroj estis en revolucio ! Efektive, la reĝeco ne plu ekzistis : restis nur tutmortigi ĝin; efektive,

la feùda reĝimo jam estis abolita. Kaj tamen, eĉ tiam, kiam la revolucio libere ondis, estis ankaŭ la kontraŭrevoluciulo Brissot, kiu havis ĉiujn ŝancojn esti aklamita kiel diktatoro ! Kaj kio estus okazinta antaŭe en 1789 ? Oni estus agnoskinta Mirabeau kiel estron de l'regpovo. La homo, kiu negocis kun la reĝo por vendi al li sian elokventon, jen kiu tiam estus portita al la regpovo, se la ribelinta popolo ne estus trudinta sian suverenecon, apogitan per pikstangoj, kaj se ĝi ne estus aginta laŭ la elprovitaj faroj de la "jacquerie" (o), vanigante ĉiun establitan povon en Parizo aŭ en la departementoj.

Sed la registara antaŭjuĝo tiel blindigas tiujn, kiuj parolas pri diktaturo, ke ili preferas prepari la diktatorecon de nova Brissot aŭ Napoleono, ol rezigni la ideon havigi novan mastron al la homoj rompantaj siajn katenojn !

La sekretaj societoj de la epoko de l'Restaŭrado kaj de Ludoviko-Filipo forte kontribuis plui̇gi tiun antaŭjuĝon pri diktaturo. La tiamaj respublikanaj burĝoj, subtenate de la laboristoj, faris longan serion da konspiroj por renversi la reĝecon kaj proklami la Respublikon. Ne konsciante pri la profunda transformo nepre necesa en Francio, eĉ nur por ke burĝa respublikana reĝimo povu establiĝi, ili imagis, ke per vasta konspirado ili iam renversos la reĝecon, kaptos la povon kaj proklamos la Respublikon. Dum preskaŭ tridek jaroj tiuj sekretaj societoj senĉese laboris kun senlima sindonemo, heroaj persistemo kaj kuraĝo. Se la Respubliko tutnature naskiĝis el la ribelego de februaro 1848, tio estas dank'al tiuj societoj, dank'al la perfekta propagando, kiun ili faris dum tridek jaroj. Sen ilia nobla strebado ankoraŭ ĝis nun ne eblus la Respubliko.

Ilia celo estis do kapti mem la regpovon, instaliĝi en respublika diktaturo. Sed, kiel antaŭvideble, neniam ili atingis tion. Kiel ĉiam, kvazaŭ fatale, konspirado ne povos renversi la reĝecon. La konspirantoj estis preparintaj la defalon. Ili vaste dissemis la

---------

(o) En Francio, en la 14a jarcento, ribelo de la kamparanoj (kromnomitaj "la Ĵakvoj") Ndt.

respublikanan ideon; iliaj martiroj faris el ĝi la idealon de l'popolo. Sed la lasta puŝo, tiu, kiu definitive renversis la reĝon de l'burĝaro, estis multe pli vasta kaj forta ol tiu, kiu povis veni el sekreta societo; ĝi venis el la popola amaso.

Oni konas la rezultaton. La partio, kiu preparis la falon de l'reĝeco, troviĝis puŝita flanken de la ŝtupoj de l'Urbodomo. Aliuloj, tro prudentaj por trakuri la kampojn de l'konspiro, sed pli konataj, ankaŭ pli moderaj, gvatante la momenton ekkapti la povon, rabis la lokon, kiun la konspirantoj kredis konkeri ĉe la bruo de l'kanonado. Publicistoj, advokatoj, belparolantoj, kiuj strebis famigi sin, dum la veraj respublikanoj forĝis la armilojn aŭ pentofaris en punlaborejo, ekkaptis la regpovon. Tiujn, jam famajn aklamis la gapantoj, la aliaj sin mem antaŭenmetis kaj estis akceptitaj, tial ke ilia nomo signifis nenion, krom programo de akordiĝemo kun ĉiuj.

Oni ne diru al ni, ke tion kaŭzis manko de elturniĝemo ĉe la aganta partio; ke aliaj povos fari pli bone. Ne, milfoje ne ! Tio estas leĝo, kiel tiu reganta la moviĝon de l'astroj, ke la aganta partio restas ekstere, dum la intrigantoj kaj la parolemuloj kaptas la regpovon. Ilin oni ekkonas en la granda amaso, kiu plenumas la lastan puŝon. Ili kolektas pli da subtenaj voĉoj, ĉar, kun aŭ sen voĉdoniloj, fakte estas ĉiam speco de interkonsenta elekto, kiu tiam okazas per aklamado. Ilin aklamas ĉiuj, ĉefe la malamikoj de la revolucio, kiuj preferas antaŭenpuŝi la sentaŭgulojn, kaj la aklamantaro tiel agnoskas estroj tiujn, kiuj ja malamas la moviĝon aŭ estas indiferentaj.

La homo (°), kiu pli ol iu ajn enkorpigis tiun konspirsistemon, la homo, kiu pagis per vivo da karcero sian sindonon al tiu sistemo, ekkriis iom antaŭ sia morto tiujn vortojn, kiuj estas tuta programo : "Nek dion, nek mastron !"

----------

(°) Aŭgusto Blanqui (1805-1881), la granda revoluciulo, partizano de diktaturo de malplimulto.

III.

Imagi, ke la registaro povus esti renversita de sekreta societo kaj ke tiu societo povus okupi ĝian lokon, estas eraro, kiu faligis ĉiujn revoluciajn organizojn naskiĝintajn ene de la respublikana burĝaro ekde 1820. Sed abundas aliaj faktoj reliefigantaj tiun eraron. Kian sindonemon, kian abnegacion, kian persistemon elmontris la respublikanaj sekretaj societoj en la juna Italio ! Kaj tamen tiun laboregon, tiujn foroferojn de la itala junularo, antaŭ kiuj modestas eĉ tiuj de la rusa revolucia junularo, ĉiujn tiujn kadavrojn amasigitajn en la kazematoj de la aŭstraj fortikaĵoj kaj sub la glavo kaj la kugloj de l'mortigisto, ĉion tion herede profitis la ruzuloj de l'burĝaro kaj de l'reĝopovo. Same estas en Rusio. Malofte oni trovas en la historio sekretan societon, kiu akiris per tiom malmulte da rimedoj tiel grandegajn rezultojn kiel tiujn atingitajn de la rusa junularo; kiu elmontris tiel potencajn energion kaj agadon kiel la Plenuma Komitato. Ĝi ŝancelis tiun koloson, kiu ŝajnis nevundebla : la carismon; kaj ĝi malebligis definitive la aŭtokratan registaron en Rusio. Kaj tamen, ege naivaj estus tiuj, kiuj imagus, ke la Plenuma Komitato mastros la regpovon kiam la krono de Aleksandro la IIIa falruliĝos en la koton. Aliuloj, la singardemuloj, kiuj klopodis famiĝi, dum la revoluciuloj fosis siajn minejojn, aŭ pereis en Siberio, aliuloj, la intrigantoj, la parolademuloj, la advokatoj, la literaturuloj, kiuj de tempo al tempo fallasas unu rapide forviŝitan larmon sur la tombon de l'herooj kaj pozas kiel popolamikoj - jen tiuj kiuj venos kapti la vakan lokon de l'registaro kaj krios "Malantaŭen !" al la "nekonatoj", kiuj estos preparintaj la revolucion.

Tio estas neevitebla, fatala, kaj ne povas okazi io alia. Ĉar nek la sekretaj societoj, nek eĉ la revoluciaj organizoj donos la mortigan baton al la registaroj. Ilia funkcio, ilia historia misio estas prepari la spiritojn al ilia revolucio. Kaj kiam la spiritoj estas preparitaj, kun la helpo de la eksteraj cirkonstancoj, la lasta puŝo venas, ne de la ini-

ciatinta grupo, sed de la amaso, kiu restis ekster la ĉeloj de la societo. La 31an de aŭgusto (1870) Parizo restis muta ĉe la alvokoj de Blanqui. Kvar tagojn poste, ĝi proklamas la senrajtigon de l'registaro; sed tiam ne plu estas la blankistoj, kiuj iniciatas la movadon : estas la popolo, la milionoj, kiuj eltronigas la decembrulon (°) kaj aklamas la farsulojn, kies nomoj resonadis de du jaroj ĉe iliaj oreloj. Kiam la revolucio estas eksplodonta, kiam la movado estas sentebla en la aero, kiam la sukceso jam fariĝis certa, tiam mil novaj homoj, sur kiuj la sekreta organizo neniam rekte influis, ekaliĝas al la movado, kiel rabobirdoj venantaj sur la batalkampon por dispartigi inter si la restaĵojn de l'viktimoj. Tiuj helpas fari la lastan puŝon, kaj ne en la vicoj de l'sinceraj kaj senkompromisaj konspirantoj, sed ĉe la balanciĝantaj marionetoj ili elektas siajn estrojn, tiom ili estas persvaditaj, ke estro necesas. La konspirantoj, kiuj plu subtenas la antaŭjuĝon pri la diktaturo, nekonscie favoras do la kaptadon de l'povo fare de siaj propraj malamikoj.

Sed se tio ĵus dirita veras rilate al la revolucioj aŭ prefere al la politikaj ribeloj, tio ankoraŭ pli veras rilate al la revolucio, kiun ni volas, la socia Revolucio. Lasi stariĝi iun ajn registaron, fortan kaj obeatan povon, tio estas bari la vojon de la revolucio tuj de la komenco. Nula estas la bono, kiun povus fari tiu registaro, kaj grandega la malbono.

Fakte, pri kio temas, kion revolucio signifas por ni ? Ĝi ne estas simpla anstataŭigo de registaro. Ĝi estas la kaptado de la tuta socia riĉaĵaro fare de la popolo. Ĝi estas la abolo de ĉiuj regpovoj, kiuj brid-adis la disvolviĝon de l'homaro. Sed ĉu per dekretoj fontantaj el registaro oni povas plenumi tiun grandegan ekonomian revolucion ? Ni vidis, en la pasinta jarcento, la polan revolucian diktatoron Kosciuzko dekreti la abolon de l'persona servuto; la servuto plu ekzistis okdek jarojn post tiu dekreto (°°). Ni vidis

---

(°)Ludoviko-Napoleono Bonaparte kaptis la regpovon per ŝtatrenverso, la 2an de decembro 1851.

(°°)Proklamo de l'7a de majo 1794, publikigita la 30an de majo. Se tiu dekreto estus aplikita, ĝi fakte signifus la abolon de l'persona servuto. (Notoj de Kropotkin)

la Konvencion, la ĉiopovan Konvencion, la teruran Konvencion, kiel diras ĝiaj admirantoj, dekreti la pokapan dispartigon de ĉiuj komunumaj bienoj rekaptitaj de l'sinjoroj. Kiel tiom da aliaj, tiu dekreto restis seneĥa, tial ke, por aplikiĝi ĝin, necesus, ke la kamparaj proletoj faru tutan novan revolucion, kaj tial ke la revoluciojn oni ne faras per dekretoj. Por ke efektiviĝu la kaptado de la socia riĉaĵaro fare de la popolo, necesas, ke la popolo sentu sin libera, ke ĝi skuu la servutecon, kiun ĝi tro kutimas, ke ĝi agu propradecide, ke ĝi antaŭeniru sen atendi alies ordonojn. Nu, ĝuste tion malhelpos la diktaturo, eĉ se la plej bonintenca el la mondo, kaj samtempe ĝi estos nekapabla progresigi la revolucion eĉ je ununura colo.

Sed se la registaro - eĉ se ĝi estas ideala revolucia registaro - ne kreas novan forton kaj havigas neniun avantaĝon por la detrulaboro, kiun ni devas plenumi, ni ankoraŭ malpli kalkulu sur ĝi por la reorganiza [illegible]sko, kiu devas sekvi la detruadon. La ekonomia ŝanĝiĝo, kiu rezultos el la socia Revolucio estos tiel grandega kaj tiel profunda, ĝi tiagrade modifos ĉiujn interrilatojn bazitajn nun sur proprieto kaj interŝanĝo, ke unu aŭ kelkaj individuoj ne povas ellabori la sociajn formojn, kiuj devas naskiĝi en la estonta socio. Tiu ellaborado de la novaj sociaj formoj povas efektiviĝi nur per la kolektiva laboro de la amasoj. Por kontentigi la grandegan diversecon de la kondiĉoj kaj de la bezonoj, kiuj naskiĝos kiam la individua proprieto estos detruita, necesas la fleksebleco de la tutlanda kolektiva spirito. Ĉiu ekstera aŭtoritato estos nur brido, malhelpo al tiu plenumota organa laboro, kaj do fonto de malakordo kaj malamoj.

Sed jam estas tempo por forlasi tiun iluzion, tiomfoje malpravigitan kaj tiomfoje multkoste pagitan, pri revolucia registaro. Jam estas tempo por konvinkiĝi kaj agnoski tiun politikan aksiomon, ke registaro ne povas esti revolucia. Oni parolas al ni pri la Konvencio; sed ni ne forgesu, ke la kelkaj iom revoluciecaj decidoj alprenitaj de la Konvencio estis la

oficialigo de faktoj efektivigitaj de la popolo, kiu tiam marŝis super la kapo de ĉiuj registaroj. Kiel diris Viktoro Hugo en sia bildoplena stilo, Danton puŝis Robespieron, Marat voktis kaj puŝis Dantonon, kaj Marat mem estis puŝata de Cimourdain (o), tiu personigo de la kluboj de l' "rabiuloj" kaj de l'ribelantoj. Kiel ĉiuj registaroj, kiuj antaŭis kaj sekvis ĝin, la Konvencio estis nur kateno ĉe la piedoj de l'popolo.

La faktoj, kiujn montras al ni la historio, estas ĉi-rilate tiel evidentaj, ke ŝajnus malfacile kompreni la obstinon, kun kiu iu skolo sin nomanta socialista subtenas la ideon pri registaro. Sed la klarigo estas tre simpla. Ĝi estas, ke, kvankam ili pretendas sin socialistoj, tiuj skolanoj havas koncepton tute alian ol la nian pri la revolucio, kiun ni devas efektivigi. Por ili, samkiel por ĉiuj burĝaj radikaluloj, la socia Revolucio estas prefere estonta afero, pri kiu oni hodiaŭ ne pensu. Tio, kion ili aspiras funde de sia koro, sed ne kuraĝas konfesi, estas io tute alia. Tio estas la instalo de registaro simila al tiu de Svisio aŭ de Usono, iom provanta ŝtatigi kion ili lerte nomas "publikaj servoj". Tio estas io, iom similanta la idealon de Bismark kaj tiun de la tajloro, kiu fariĝas prezidento de Usono. Tio estas antaŭe farita kompromiso inter la socialistaj aspiroj de la amasoj kaj la apetito de l' burĝaro. Ili ja volus la kompletan ekspropriigon, sed ili prokrastas ĝin ĝis la venonta jarcento, kaj, antaŭ la batalo, ili jam ektraktas kun la malamiko.

Por ni, kiuj komprenas, ke proksimiĝas la momento doni al la burĝaro la mortigan baton; ke ne foras la momento, kiam la popolo povos ekkapti la tutan socian riĉaĵaron kaj senpotencigi la ekspluatantan klason; por ni do ne povas esti hezito. Ni ĵetos nin korpe kaj anime en la socian Revolucion kaj, ĉar en tiu vojo obstaklas registaro - kia ajn estas la ĉapo, per kiu ĝi kapvestas sin - ni senpotencigos kaj forbalaos la ambiciulojn laŭmezure kiel ili venos por sin trudi kaj regi niajn destinojn. Sufiĉe, la registaroj ! lokon al la popolo, al la anarkio !

---

(o) C., heroo de l'romano de V.Hugo: "Quatre-vingt-treize"

# Anarkista agado en la revolucio

I

Masakri la burĝojn por triumfigi la Revolucion estas sensenca revo. Ilia nombro mem tion malebligas; ĉar, krom la milionoj da burĝoj, kiuj devus malaperi, laŭ la hipotezo de la modernaj Fouquier-Tinville, estus ankoraŭ milionoj da duonburĝaj laboristoj, kiuj devus sekvi ilin. Fakte tiuj ĉi emas nur fariĝi burĝoj siavice kaj ili rapide fariĝus tio, se la ekzisto de l'burĝaro estus trafita nur en siaj rezultoj, sed ne en siaj kaŭzoj. Kaj la organizita kaj leĝigita Teroro vere utilas nur por forĝi katenojn por la popolo. Ĝi mortigas la individuan iniciatemon, kiu estas la animo de l'revolucioj; ĝi pluigas la ideon pri forta kaj obeata registaro; ĝi preparas la diktaturon de tiu, kiu ekkaptos la revolucian tribunalon kaj scipovos ĝin direkti, kun ruzo kaj prudento, por la intereso de sia partio.

Armilo de l'registaro, la Teroro servas antaŭ ĉio la estrojn de la registaraj klasoj; ĝi preparas la terenon, por ke la malplej skrupulaj el ili kaptu la regpovon.

La Teroro de Robespiero devis nepre konduki al tiu de Tallien, kaj tiu ĉi - al la diktaturo de Bonaparto. Robespiero ja kovis Napoleonon.

Por venki la burĝaron, necesas io tute diferenca, ol tio konsistiganta ĝian nunan forton, necesas aliaj elementoj, ol tiuj, kiujn ĝi lernis tiel bone regi. Tial endas unue esplori tion, kio faras ĝian forton, kaj al tiu forto kontraŭmeti alian, superan forton.

o o
o

Kio fakte permesis al la burĝaro forĵongli ĉiujn revoluciojn depost la dekkvina jarcento ? profiti de tio por servutigi kaj pligrandigi sian superregadon, sur bazoj multe pli firmaj ol la respekto al religiaj superstiĉoj aŭ la denaska rajto de la aristokrataro ?

- La Ŝtato. La senĉesa kreskado kaj plilarĝiĝado de la funkcioj de l'Ŝtato, bazita sur tiu fundamento multe pli firma ol religio aŭ heredrajto : la Leĝo. Kaj tiel longe dum daŭros la Ŝtato, dum la Leĝo restos sankta por la okuloj de l'popolo, dum la venontaj revolucioj strebados pluteni kaj plivastigi la funkciojn de la Ŝtato kaj de la Leĝo, la burĝaro estos certa konservi la regpovon kaj superregi la amasojn. La leĝistoj konsistigantaj la ĉiopovan Ŝtaton, jen la origino de l'burĝaro, kaj estas ankaŭ la ĉiopova Ŝtato, kiu faras la nunan forton de la burĝaro. Per la Leĝo kaj la Ŝtato la burĝoj ekkaptis la kapitalon, kaj starigis sian aŭtoritaton. Per la Leĝo kaj la Ŝtato ili plutenas ĝin. Per la Leĝo kaj la Ŝtato ili ankaŭ promesas kuraci la malsanojn, kiuj turmentas la socion.

o o o

Fakte, tiel longe dum la landaj aferoj estos prizorgataj de kelkiuj, kaj dum tiuj aferoj estos tiel labirinte kompleksaj kiel nun, la burĝoj povos trankvile dormadi. Ili estas tiuj, kiuj, imitante la romian tradicion de la ĉioscia Ŝtato, konstruis, ellaboris, starigis tiun mekanismon; ili, kiuj estis ties subtenantoj dum la moderna historio. Ili pristudas ĝin en siaj universitatoj; ili plutenas ĝin en siaj tribunaloj, ili instruas ĝin en lernejoj; ili disvastigas, encerbigas ĝin pere de sia gazetaro.

Ilia cerbo estas tiel bone modlita laŭ la tradicio de l'Ŝtato, ke neniam ili flankenmetas ĝin, eĉ en siaj priestontaj revoj. Iliaj utopioj portas ĝian stampon. Ili povas koncepti nenion, ekster la principoj de la romia Ŝtato, pri la strukturo de l'Socio. Se ili renkontas instituciojn evoluintajn ekster tiuj konceptoj, ĉu en la vivo de l'francaj kamparanoj, ĉu aliloke, ili disrompas ilin prefere ol rekoni ties kialojn.

Tiel la jakobenoj daŭrigis la detruadon de la popolaj institucioj, kiun komencis Turgot. Li abolis la primarajn vilaĝajn kunsidojn, la "mir", kiu ankoraŭ vivis liatempe, ĉar li trovis ĝin tro tumulta, nesufiĉe ordigita. La jakobenoj daŭrigis lian verkon : ili abolis la familiajn komunumojn, kiuj sukcese evitis la hakilon de la romia ĵuro; ili finmortigis la komunuman posedon de l'grundo.... Kaj la modernaj jakobenoj, malkovrante la komunumon kaj la federacion de l'triboj ĉe la Kabiloj, preferis masakri tiujn instituciojn per siaj tribunaloj, ol malobservi siajn romiajn konceptojn pri proprieto kaj hierarkio. Same agis la anglaj burĝoj en Hindio.

Tiel, ekde kiam la Granda Revolucio de la pasinta jarcento (1789, Ndt) siavice adoptis la romiajn doktrinojn pri ĉiopova Ŝtato, sublimigitajn de Rousseau kaj far li prezentitajn kun etiketo pri romi-katolikaj Egalo kaj Frateco, ekde kiam ĝi adoptis kiel bazon de sociorganizado la proprieton kaj la balotitan registaron - tiam la nepojn de la "leĝistoj" de l' XVIIa jarcento, la burĝojn koncernis la tasko organizi kaj regi Francion laŭ tiuj principoj. La popolo havis pri tio nenion plu por fari, ĉar ĝia krea forto estas tute alicela.

II

Se, bedaŭrindege, dum la venonta revolucio, la popolo plian fojon ne komprenus, ke ĝia historia misio estas disrompi la Ŝtaton kreitan per la kodoj de Justiniano kaj la papaj ediktoj; se ĝi lasus sin plian fojon blindiĝi per la "leĝaj" romiaj konceptoj pri Ŝtato kaj proprieto (por kio vigle strebadas la aŭtoritataj socialistoj) - tiam ĝi ankoraŭfoje devus forlasi la zorgon starigi tian organizon al tiuj, kiuj estas ties veraj historiaj reprezentantoj : la burĝoj.

Se ĝi ne komprenus, ke la vera celkialo de popola revolucio estas detrui la Ŝtaton, nepre hierarkian, por anstataŭe celi la liberan interkonsenton de la individuoj kaj de l'grupoj, la liberan kaj portempan federiĝon (ĉiufoje por difinita celo); se ĝi ne komprenus, ke endas aboli la proprietaĵon kaj la rajton

ĝin akiri, forigi la regadon de l'elektitoj, kiu venis anstataŭi ĉies liberan interkonsenton; se la popolo rezignus la tradiciojn de la individua libero, de la memvola grupiĝo kaj de la libera interkonsento kiel bazo de la kondutreguloj - tradiciojn, kiuj estis la esenco de ĉiuj antaŭaj popolmovadoj kaj de ĉiuj popolkreitaj institucioj; se ĝi forlasus tiujn tradiciojn kaj reuzus tiujn de la romi-katolika Romo - tiam ĝi havus nenion por fari en la revolucio; ĝi devus ĉion lasi al la burĝaro kaj sin limigi, petante de ĝi kelkajn koncedojn.

La ŝtatisma koncepto estas tute fremda al la popolo. Feliĉe ĝi neniel komprenas ĝin kaj ne scias ĝin uzi. Ĝi restis popoleca; ĝi restis saturita de konceptoj el la t.n. <u>komuna</u> rajto, konceptoj bazitaj sur ideoj de reciproka justeco inter individuoj, sur realaĵoj, dum la rajto de l'Ŝtatoj baziĝas ĉu sur metafizikaj konceptoj, ĉu sur fikciaĵoj, ĉu sur interpretado de vortoj kreitaj en Romo aŭ Bizanco dum putra epoko, por pravigi la ekspluatadon kaj la forigon de la popolaj rajtoj.

Plurfoje la popolo provis eniri en la ŝtatajn kadrojn, kapti ilin, uzi ilin. Ĝi neniam sukcesis.

Kaj ĝi ĉiam fine forlasis tiun mekanismon el hierarkio kaj leĝoj al aliuloj : al la reĝo post la revolucioj de l'16a jc.; al la burĝoj post tiuj de la 17a jc. en Anglio kaj de l'18a en Francio.

o o o

Male, la burĝaro tute identigis sin kun la rajto de l'Ŝtatoj. Tio konsistigas ĝian forton. Tio donas al ĝi tiun pensunuecon, kiu ĉiumomente mirigas nin.

Fakte, iu Ferry povas abomeni iun Clémenceau; iu Floquet, iu Freycinet, iu Ferry povas cerbumi la batojn, kiujn ili preparas por la prezidentecon forpreni de iu Grévy aŭ de iu Carnot; la papo kaj ties klerikaro povas malami la tri kunulojn kaj defalĉi al ili la herbon el sub la piedoj; la bulanĝisto (o) povas tutegale malami la klerikaron kaj la papon, Ferry kaj Clémenceau. Ĉio ĉi povas okazi kaj okazas.

---

(o) bulanĝisto : subtenanto de Boulanger.

Sed io supera al tiuj malamikecoj kunligas ilin ĉiujn, de la bulvarda publikulino ĝis la miela Carnot, de la ministro ĝis la lasta profesoro de laika aŭ religia liceo. Tio estas la kulto al la aŭtoritato.

Ili ne povas koncepti la socion sen forta kaj obeata registato. Sen la centralizado, sen hierarkio radianta de Parizo aŭ de Berlino ĝis la lasta kampogardisto kaj funkciiganta la lastan vilaĝeton laŭ la ordonoj de la ĉefurbo, ili vidas nur diseriĝon. Sen kodo - kreaĵo komuna de Montaranoj de l' Konvencio kaj de la imperiaj princoj - ili vidas nur murdojn, incendiojn, rabadojn en la stratoj. Sen la proprieto garantiata per la kodo, ili vidas nur dezertajn kampojn kaj ruinajn urbojn. Sen armeo, brutigita ĝis blinde obei al siaj estroj, ili vidas la landon predata de la invadintoj; kaj sen la juĝistoj, tiom ĉirkaŭitaj per respekto, kiom estis la "corpus dei" en la mezepoko, ili antaŭvidas nur militon de ĉiu kontraŭ ĉiuj. La ministro kaj la kampogardisto, la papo kaj la instruisto absolute akordas pri tiuj punktoj. Tio konsistigas ilian komunan forton.

o o o

Ili ja scias, ke ŝtelado konstantas en la civilaj kaj armeaj oficejoj. Sed "Ne gravas!" ili diras; tio estas nur individuaj akcidentoj; kaj tiel longe dum ekzistos oficejoj, la monujo kaj la patrio ne estos en danĝero.

Ili scias, ke la balotadoj estas farataj per mono, bierglasegoj kaj bonfaraj festoj, kaj ke en la Parlamento la voĉojn oni aĉetas per oficoj, koncesioj kaj ŝteloj. Ne grave ! La leĝon adoptitan de la popolelektitoj ili konsideros sankta. Oni evitos, oni perfortos ĝin, se ĝi ĝenos, sed oni faros flamajn paroladojn pri ĝia dia karaktero.

La ĉefministro kaj la opoziciestro povas sin insulti reciproke en la Parlamento; sed, kiam finita la parolturniro, ili sin reciproke respektas : ili ja ambaŭ estas estroj, du necesaj funkcioj en la Ŝtato.

Kaj se la prokuroro kaj la advokato ĵetas insultojn unu al la alia trans la kapo de la akuzito kaj sin nomas reciproke (en eleganta lingvaĵo) mensogulo

kaj fripono - kiam finitaj la paroladoj, ili interpremas la manojn kaj gratulas unu la alian pro siaj "emociaj" vortŝutadoj. Tio ne estas hipokriteco, nek bonedukiteco. Funde de sia koro la advokato admiras la prokuroron kaj la prokuroro admiras la advokaton; ili vidas unu en la alia ion superan al iliaj personecoj : du funkciojn, du reprezentantojn de la justico, de la registaro, de la Ŝtato. Ilia tuta edukado preparis ilin al tiu vidmaniero, kiu permesas sufoki la homajn sentojn sub leĝaj formuloj. Neniam la popolo atingos tiun perfekton, kaj estus pli bone por ĝi neniam voli tion provi.

o o
o

Komuna adorado, komuna kulto unuigas ĉiujn burĝojn, ĉiujn ekspluatantojn. La regestro kaj la estro de la leĝa opozicio, la papo kaj la burĝa ateisto same adoras saman dion, kaj tiu aŭtoritateca dio loĝas ĝis en la plej kaŝaj anguloj de iliaj cerboj. La Ŝtatestro forigus de si la estron de la opozicio kaj la prokuroro la advokaton, nur kiam la opozicioestro pridubus la parlamentan institucion mem, kaj kiam la advokato traktus la tribunalon mem kiel vera nihilisto, t.e. neus ĝian ekzistorajton. Tiam, sed nur tiam, ili povus sin disigi. Dume, ili unuiĝinte dediĉas sian malamon kontraŭ tiuj, kiuj subfosas la Ŝtatan superregadon kaj detruas la respekton al la aŭtoritato. Kontraŭ ĉi-lastaj ili estas rigoraj. Kaj se la burĝoj de l'tuta Eŭropo tiom malamis la laboristojn de la Pariza Komuno, estas ja ĉar ili konsideris ilin veraj revoluciuloj, pretaj forĵeti la Ŝtaton, la proprieton kaj la balotitan registaron. Oni komprenas kian forton donas al la burĝaro tiu komuna kulto al la hierarkia povo.

Kiel ajn putrinta ĝi estas en tri kvaronoj el siaj reprezentantoj, ĝi tamen ankoraŭ havas en sia sino kvaronon da homoj firme tenantaj Ŝtatan flagon.

Krude kaj fervore laboremaj tiel pro sia prileĝa religio kiel pro sia regavido, ili senĉese laboras por firmigi kaj disvastigi tiun kulton. Tuta ampleksega literaturo, ĉiuj lernejoj senescepte, la tuta gazetaro, estas je ilia servo, kaj ĉefe en sia junularo

ili strebadas kontraŭbatali ĉiujn provojn kontesti la ŝtatisman, leĝecan koncepton. Kaj kiam alvenas batalokazoj, ĉiuj, tiel la malfortikuloj kiel la vigluloj, alpremas sin ĉirkaŭ tiu flago. Ili scias, ke ili regos tiel longe dum flirtos tiu flago.

Oni komprenas ankaŭ, kiel sensenca estas la volo loki la revolucion sub tiun flagon, la strebado instigi la popolon, spite ĉiujn ties tradiciojn, akcepti tiun principon, kiu estas tiu de superregado kaj de ekspluatado. Aŭtoritateco estas ilia flago, kaj tiel longe dum la popolo ne havas alian, kiu estos la esprimo de ĝiaj emoj al komunismo, kontraŭleĝecaj kaj kontraŭŝtatismaj - unuvorte, kontraŭromiaj - ĝi nepre devos sin lasi gvidi kaj superregi far la alia tendaro.

Ĉefe tie la revoluciulo devas havi aŭdacon. Li devas aŭdaci tute ĉesigi rilaton kun la romi-katolika tradicio; li devas kuraĝe konvinkiĝi, ke la popolo devas ellabori mem la tutan organizadon de l'socioj sur bazoj de reala justeco, tia kia konceptas ĝin la komuna rajto popola.

III

Aboli la Staton, jen, laŭ ni, la tasko trudiĝanta al la revoluciulo - almenaŭ al tiu, kiu havas la pens-aŭdacon, sen kiu ne eblas fari revoluciojn. Kontraŭ li staras ĉiuj tradicioj de la burĝaro. Sed por li estas la tuta homara evoluo, kiu trudas al ni en tiu historia momento liberiĝi el formo de grupiĝo - eble necesigita pro la estinta malklero - sed de nun fariĝinta malfavora al ĉiu estonta progreso.

Tamen, la abolo de l'Ŝtato restus vana vorto, se plufunkcius la kaŭzoj hodiaŭ kreantaj la mizeron. Samkiel la riĉeco de l'potenculoj, samkiel la kapitalo kaj la ekspluatado, tiel ankaŭ la Ŝtato naskiĝis el malriĉiĝo de parto de l'socio. Ĉiam necesis, ke iuj falu en mizeron, sekve de migradoj, invadoj, pestoj aŭ malsategoj, por ke aliaj riĉiĝu kaj akiru aŭtoritaton, kiu de tiam povis kreski, igante pli kaj pli malcertaj la ekzistorimedojn de la amasoj.

La politikan superregon oni do ne povas aboli sen aboli la kaŭzojn mem de la malriĉiĝo, de la mizero

de la amasoj.

Por tion atingi - tion ni diris multfoje - ni vidas nur unu rimedon.

Unue, certigi al ĉiuj la ekzistadon kaj eĉ la bonhavecon kaj organiziĝi tiel ke oni produktu kolektive ĉion necesan por certigi la bonhavecon. Per la nuntempaj produktorimedoj, tio estas pli ol ebla : tio estas facila.

Akcepti tion rezultantan el la tuta moderna ekonomia evoluo; t.e. koncepti la tutan socion kiel tutaĵon, kiu produktas riĉaĵojn, sen ke eblas determini la parton rajte apartenantan al ĉiu en la produktado. Organiziĝi en komunisma socio - ne pro konsideroj pri absoluta justeco, sed ĉar fariĝis neeble determini la individuan parton en tio, kio ne plu estas individua laboro.

Kiel vidate, vastega estas la problemo leviĝanta antaŭ niajarcenta revoluciulo. Ne plu temas nur pri simpla neado, ekzemple, aboli la servuton aŭ rezigni la papan superregon.

Temas pri konstrua verko : malfermi novan paĝon de la universala historio, ellabori tute novan sociordon, bazitan - ne plu sur la solidaro sine de la tribo, aŭ de la vilaĝa komunumo, aŭ de la civito, sed sur ĉies solidareco kaj egaleco. Ĉar fiaskis la provoj de limigita solidaro, ĉu per parenc-ligiloj, ĉu per teritoriaj limsignadoj, ĉu per gildaj aŭ klasaj ligiloj, ni estas puŝataj klopodi por ellabori socion bazitan sur multe pli larĝa koncepto ol tiu, kiu taŭgis por subteni la mezepokan aŭ antikvajn sociojn.

La solvota problemo certe ne estas tiel simpla, kiel oni tiel ofte prezentis ĝin. Ŝanĝi la regantaron kaj reveni ĉiu en sian laborejon por tie rekomenci la hieraŭan laboron, ekcirkuligi laborkuponojn kaj interŝanĝi ilin kontraŭ varoj - tiuj trosimpligaj solvoj ne sufiĉus; tio ne funkcius, ĉar la nuna produktado estas tute same falsa en siaj sopirataj celoj kiel en la uzataj rimedoj.

Starigite por pluigi la malriĉecon, ĝi ne povus garantii la abundon - ĝuste la abundon postulas la amasoj, de kiam ili komprenis sian produktivan forton,

kiun senlimigas la progresoj de la modernaj scienco kaj teknikoj. Ellaborita por teni la amasojn en preskaŭ mizera stato, kun la fantomo de l'malsato ĉiam preta trudi al la homo vendi siajn fortojn al la posedantoj de l'grundo, de l'kapitalo kaj de l'povo - kiel la nuna organizo de la produktado havigus la bonstaton ?

Ellaboritaj por pluigi la hierarkion de l'laboristoj, faritaj por ekspluati la kamparanon profite al la industria laboristo, la ministon profite al la mekanikisto, la metiiston profite al la artisto, kaj tiel plu, dum la civilizitaj landoj ekspluatos la malevoluintajn landojn - kiel agrikulturo kaj industrio tiaj, kiaj ili estas hodiaŭ, povus certigi la egalecon ?

La tutan karakteron de agrikulturo, de industrio, de laboro oni tute devas ŝanĝi, ekde kiam la socio revenas al tiu ideo, ke la grundo, la maŝino, la uzino, devas esti laborkampoj uzotaj por doni bonstaton al ĉiu. Antaŭ ol reiri en la laborejon, "post la revolucio", kiel diras al ni la aŭtoritat-socialistaj utopiuloj, necesos ankaŭ scii, ĉu tia laborejo, tia uzino, produktantaj perfektigitajn instruilojn aŭ brutigilojn, havas ekzistorajton; ĉu la kampon oni parceligu aŭ ne, ĉu la kultivadon oni faru kiel ĉe la barbaroj el antaŭ mil kvincent jaroj, aŭ ĉu oni faru ĝin kun la celo havigi la plej grandan kvanton da produktoj necesaj al la homo ?

Tutan transform-periodon oni devas trairi. La revolucion oni devas porti en la uzinon kaj sur la kampon, en la kabanon kaj en la urban domon, al la plugilo same kiel al la potenca maŝino de la grandaj laborejoj, en la grupiĝon de l'kultivistoj, kiel en la grupiĝojn de l'fabrik-laboristoj, same kiel en la ekonomiajn rilatojn inter ĉiuj, kiuj laboras, en la interŝanĝon kaj la komercon, kiujn oni ankaŭ devas socialigi, same kiel la konsumadon kaj la produktadon.

Krome endas, ke dum tiu transform-periodo ĉiu vivu, ke ĉiu sentu sin pli komforte ol en la estinteco.

o o
o

Kiam la loĝantoj de l'komunumoj de la 12a jc. entreprenis fondi en la ribelantaj civitoj novan socion, liberigitan el la landsinjoro, ili komence starigis solidaran interkonsenton inter ĉiuj loĝantoj. La komunumaj ribelantoj ĵuris interhelpon; ili faris kion oni nomis "kunĵurado" (o) de l'komunumoj.

Per samspeca interkonsento devos komenciĝi la socia revolucio. Interkonsento por la vivo en komunumo, ne por la morto; por unuiĝo ne por interekstermado. Solidara interkonsento por konsideri la tutan heredaĵon de l'pasinto, kiel komunan posedaĵon, interkonsento por dispartigi laŭ justecaj principoj ĉion, kio povos utili por trairi la krizon : porvivaĵojn kaj municion, loĝejojn kaj enmagazenigitajn fortojn; ilojn kaj maŝinojn, scion kaj povon - solidara interkonsento por konsumi la produktojn, same kiel por uzadi la produktilojn.

Fortigite per siaj kunĵuradoj, la burĝoj de la 12a jarcento - en la momento mem kiam ili estis komencontaj sian lukton kontraŭ la landsinjoro, por povi ekzisti dum tiu lukto kaj konduki ĝin al la celo - ekorganizis siajn gildojn kaj metiajn societojn. Tiel ili sukcesis certigi ian bonfarton al la urbanaro. Same, fortigite per la solidara interkonsento, kiu estos liginta la tutan socion por travivi ĝojajn aŭ malfacilajn momentojn kaj partopreni la konkerojn, same kiel la malvenkojn, la revolucio tiam povos tutsekure entrepreni la antaŭ si starantan, grandegan verkon reorganizi la produktadon. Sed tiun interkonsenton ĝi devos fari, se ĝi volos vivi.

Kaj en ĝia nova verko, kiu devos esti konstrua verko, la popolamasoj devos kalkuli ĉefe sur siaj propraj fortoj, sur sia iniciatemo kaj sia organiza genio, sur sia kapablo malfermi novajn vojojn, tial, ĉar la tuta edukado de la burĝaro okazis en tute kontraŭa direkto.

Grandega estas la problemo. Sed ĝin antaŭe subtaksante, la popolo ne trovos la necesajn fortojn por solvi ĝin. Male, konsiderante ĝin en ties tuta grandeco,

---

(o)Tiu vorto poste iĝis sinonimo de "komploto" !(Ndt)

ĉerpante sian inspiron el la malfaciloj mem de la situacio, la popolo trovos la genion necesan por venki.

Ĉiuj vere grandaj progresoj de la homaro, ĉiuj vere grandaj faroj de la popoloj, okazis laŭ tiu maniero kaj nur en la konsidero al la grandeco de sia tasko la revolucio trovos siajn fortojn.

Ĉu ne endas do, ke la revoluciulo plene konsciu la taskon, kiu lin koncernas ? ke li ne fermu la okulojn ĉe la malfaciloj ? ke li sciu fronte rigardi ilin ?

Farante kunĵuradon kontraŭ ĉiuj mastroj - kunĵuradon por certigi al ĉiuj la liberon kaj ian bonfarton - tiel komencis la ribelantaj civitanoj en la 12a jarcento. Ankaŭ per kunĵurado por garantii al ĉiuj panon kaj liberon, devos komenciĝi la socia revolucio. Ĉiuj, sen ajna escepto, sciu, ke kio ajn okazos al la revolucio, ĝia unua zorgo ĉiam estos provizi panon, loĝejon, vestaron al la loĝantaro de la civito aŭ de la teritorio - kaj en tiu nura fakto pri ĝenerala solidaro la revolucio trovos fortojn, kiuj mankis al la antaŭaj revolucioj.

Sed por tio, endas rezigni la agmanieron de la malnova, burĝa politik-ekonomio. Endas sin liberigi definitive el la salajreco, sub ĉiuj ĝiaj eblaj formoj, kaj konsideri la socion kiel grandan tutaĵon, organizitan por produkti plejeble grandan kvanton da bonfarto, kun minimuma perdo de homaj fortoj. Endas kutimiĝi konsideri la personan pagadon de la servoj kiel neeblaĵon, kiel fiaskintan provon el la pasinto, kiel balaston por la estonto, se ĝi plu ekzistus.

Kaj necesas sin liberigi, ne nur principe sed ĝis en la plej malgrandaj aplikadoj, el la aŭtoritateco, el la funkci-centralizado, kiu konsistigas la esencon de la nuna socio.

Ĉar tia estas la problemo, estus malgajige, se la revoluciaj laboristoj iluziiĝus pri ĝia simpleco, aŭ se ili ne provus jam esplori kiamaniere ili intencas ĝin solvi.

o o
o

## IV

La burĝaro estas forto, ne nur ĉar ĝi posedas la riĉaĵojn, sed ĉefe ĉar ĝi profitis de la senokupeco, kiun havigis al ĝi la riĉaĵoj, por instrui al si la regarton kaj por ellabori sciencon, kiu utilas por pravigi la superregadon. Ĝi scias kion ĝi volas, ĝi scias tion, kio necesas, por ke pluekzistu ĝia soci-idealo; kaj tiel longe dum ankaŭ la laboristo mem ne scios tion, kio necesas, kaj kiel atingi ĝin, li devos resti la sklavo de la scianto.

Estus certe absurde, se oni volus ellabori, en la imago, socion tian, kia ĝi naskiĝos el la revolucio. Estus harfendado jam kvereli pri la rimedoj kontentigi iun bezonon de la estonta socio, aŭ pri la maniero organizi iun detalon de la publika vivo. La romanoj, kiujn vi faras pri la estonto, utilas nur por precizigi niajn aspirojn, por pruvi la ebleçón de senmastra socio, por esplori ĉu la idealo povas esti aplikata, sen kolizii kontraŭ netranspaseblaj obstakloj. Romano restas romano. Sed ĉiam estas iuj ĝeneralaj linioj, pri kiuj endas akordiĝi por konstrui ion ajn.

La burĝoj de 1789 perfekte sciis, ke estus senutile pridiskuti la detalojn de la parlamenta registaro, kiun ili revis; sed ili akordis pri du esencaj punktoj : ili volis fortan registaron, kaj ke tiu registaro estu reprezenta. Pli ol tio : ĝi estu centralizita, havante kiel organojn en la provincoj hierarkion el funkciuloj, kaj tutan serion da registaretoj per la elektitaj urbestraroj. Sed krome, ĝi konsistu el du apartaj branĉoj : la leĝodona povo kaj la plenuma povo. Tio, kion ili nomis "justico", estu sendependa de la plenuma povo kaj certagrade ankaŭ de la leĝodona povo.

Pri du esencaj punktoj de la ekonomia demando ili akordis. En ilia soci-idealo la privata proprieto staris eksterdiskute kaj la laŭdira "libero de l'kontrakto" devis esti proklamita kiel fundamenta organizprincipo. Krome, la pli bonaj el ili fakte kredis, ke tiu principo regeneros la socion kaj fariĝos fonto por ĉies riĉiĝo.

Ĉar ili estis des pli cedemaj pri la detaloj, ke ili estis firmaj pri tiuj esencaj punktoj, ili povis en unu aŭ du jaroj tute reorganizi Francion laŭ sia idealo kaj doni al ĝi civilan kodon (poste uzurpitan de Napoleono) - kodon, kiun poste kopiis la eŭropaj burĝaroj, ekde kiam ili kaptis la regpovon.

Ili alstrebis tion kun mirinda kuneco. Kaj se, pli poste aperis teruraj luktoj en la Konvencio, tio okazis ĉar la popolo, vidante trompitaj siajn esperojn, ekprezentis novajn postulojn, kiujn ĝiaj gvidantoj eĉ ne komprenis, aŭ kiujn kelkaj el ili vane provis akordigi kun la burĝa revolucio.

La burĝoj sciis, kion ili volis; jam delonge ili pripensis tion. Dum longaj jaroj ili flegis idealon de registaro; kaj kiam la popolo ekribelis, ili laborigis ĝin por la realigo de sia idealo, oferante al ĝi kelkajn duarangajn cedojn pri iuj punktoj, ekzemple la abolo de l'feŭdaj rajtoj aŭ la egaleco antaŭ la leĝo.

o o
o

Ne konfuziĝante en la detaloj, la burĝoj estis skizintaj, frue antaŭ la revolucio, la grandajn liniojn de la estonto. Ĉu ni povas diri la samon pri la laboristoj ?

Bedaŭrinde ne. En la tuta moderna socialismo, kaj ĉefe en sia modera frakcio, ni konstatas fortan emon ne profundigi la principojn de la socio, kiun oni volus triumfigi per la revolucio. Tio estas komprenebla. Ĉe la moderuloj paroli pri revolucio estas jam sin kompromiti, ili antaŭvidetas, ke se ili skizus antaŭ la laboristoj simplan reform-planon, ili perdus siajn plej ardajn subtenantojn. Tial ili preferas malŝate trakti tiujn, kiuj parolas pri la estonta socio aŭ provas precizigi la revolucian taskaron. "Tion oni prizorgos poste, oni elektos la plej bonajn homojn, kaj tiuj ĉi faros ĉion kiel eble plej bone ! " Jen ilia respondo.

Kaj ĉe la anarkistoj, la timo troviĝi malsame opiniantaj pri la demandoj de estonta socio kaj paralizi la revolucian impeton, efikas sammaniere; oni ĝenerale preferas, inter laboristoj, prokrasti la diskutadojn, kiujn oni nomas (malprave, kompreneble) teoriaj,

kaj oni forgesas, ke eble post kelkaj jaroj oni alvokiĝos esprimi sian opinion pri ĉiuj demandoj de soci-organizado, ekde la funkciado de l'panbakejoj ĝis tiu de l'lernejoj aŭ de la teritoria defendo - kaj ke oni havos antaŭ si eĉ ne la modelojn pri la angla revolucio, kiuj inspiris la Ĝirondanojn en la pasinta jarcento.

o o
o

En la revoluciaj medioj oni tro emas konsideri la revolucion kiel grandan feston, dum kiu ĉio kiel eble plej bone aranĝiĝos per si mem. Sed, efektive, la tagon kiam estos falintaj la malnovaj institucioj, la tagon kiam tiu grandega maŝino - kiu pli malpli malbone kontentigas la ĉiutagajn bezonojn de l' plimulto - ĉesos funkcii, ja endos, ke la popolo mem ekprenu sur sin la reorganizadon de la difektita maŝino.

Nur eldonante dekretojn, kopiitajn laŭ la malnovaj, jam de longe konataj, respublikaj kliŝoj, iuj Lamartine kaj Ledru-Rollin tagnokte plume laboradis. Sed kion celis tiuj dekretoj ? Ili nur ripetis la sonorajn frazojn, kiujn oni dum jaroj gurdadis en la respublikaj kunvenoj kaj kluboj, kaj tiuj dekretoj temis pri nenio konsistiganta la esencon mem de la ĉiutaga vivo de la nacio. Ĉar la provizora registaro de 1848 tuŝis nek la proprieton, nek la salajron, nek la ekspluatadon, tial ĝi povis ja sin limigi per pli malpli pompaj frazoj, per ordonoj, unuvorte, farante kion oni ĉiutage faras en la ŝtataj oficejoj. Nur la frazaron ĝi devis ŝanĝi. Kaj tamen tiu nura laboro foruzis jam ĉiujn fortojn de la novvenkintoj.

Por ni, revoluciuloj, kiuj komprenas, ke la popolo devas antaŭ ĉio nutri sin kaj siajn idojn, la tasko estos multe pli malfacila: Ĉu estas sufiĉe da faruno ? Ĉu ĝi atingos la bakujojn de l'panistoj ? Kaj kion fari, por ke ne ĉesu la alvenoj de viando kaj legomoj ? Ĉu ĉiu havas loĝejon ? Ĉu la vestaro ne mankas ? Kaj tiel plu. Jen kio okupos nin.

Sed ĉio ĉi postulos grandegan, kruelan - taŭgas la vorto - laboron fare de tiuj, kiuj fervore strebos por la sukceso de l'revolucio. - "Iuj febris dum ok

tagoj, ses semajnoj, diris ekskonvenciano en siaj Memoraĵoj, sed febris ni seninterrompe dum kvar jaroj". Kaj konsumate pro tiu febro, meze de ĉiuj malamikaĵoj kaj de ĉiuj elreviĝoj - ĉar ankaŭ tio okazos - devos labori la revoluciulo.

Li devos agi. Sed kiel agi se li ne scias, jam delonge, la ideon, kiu gvidos lin, la grandajn liniojn de la organizo, kiu, laŭ li, respondas la bezonojn de l'popolo, ties malprecizajn dezirojn, ties hezitantan volon ?

Kaj iuj ankoraŭ maltimas aserti, ke ĉio ĉi estas senutila, ke ĉio aranĝiĝos per si mem ! Pli inteligentaj ol tiuj, la burĝoj jam studas la rimedojn por obeigi al si la revolucion, ĝin forĵongli, ĝin direkti en vojon, kie ĝi nepre fiaskos. Ili studas, ne nur la rimedojn por frakasi per armiloj la popolan ribelon, en la kamparoj (per kirasitaj trajnoj, pafmaŝinoj) same kiel en la urboj (tie, la staboj perfekte studis la detalojn), sed ili studas ankaŭ la rimedojn por obeigi al si la revolucion, farante al ĝi cedojn iluziajn sed oportunajn, semante la korupton inter la revoluciuloj, direktante ilin en vojojn, kie la revolucio certe enkotiĝos en la ŝlimo de la persona profito kaj de la malnoblaj interindividuaj luktoj.

Jes, la revolucio estos festo, se ĝi strebos por ĉies emancipiĝo; sed por ke efektiviĝu tiu emancipiĝo, la revoluciulo devos manifesti pens-aŭdacon, agenergion, juĝ-certecon, kaj labor-fervoron, kiujn la popolo malofte montris en la antaŭaj revolucioj, sed kies pioniroj jam ekaperis en la lastaj tagoj de la Pariza Komuno kaj en la unuaj strikotagoj de tiuj lastaj dudek jaroj (tiu teksto aperis broŝurforme en 1914. Ndt).

V

- "Sed kie ni prenos tiun pens-aŭdacon kaj tiun energion por la organizlaboro se la popolo ne posedas ĝin ? Ĉu vi mem ne konsentas - oni diros al ni - ke se la atakforto ne mankas al la popolo, la pens-aŭdaco kaj la fervoro por la rekonstruado tro ofte mankis al ĝi ?"

Tion ni volonte konsentas. Sed ni ankaŭ ne forgesas la parton, kiun prenas la iniciatemuloj en la popolaj movadoj. Kaj pri tiu iniciatemo ni mallonge tuj parolos por fini nian studon.

La iniciatemo, ĉies libera iniciativo, kaj la ebleco por ĉiu manifesti tiun forton dum la popolaj ribeloj, jen kio ĉiam konsistigis la nerezisteblan potencon de l'revoluciuloj. La aŭtoritatecaj historiistoj pri tio malmulte aŭ tute ne parolas. Sed sur tiu forto ni kalkulas por entrepreni kaj plenumi la grandegan verkon de l'socia revolucio.

Se la pasintaj revolucioj ion plenumis, tion ili dankas al la iniciatemuloj kaj iniciatemulinoj, al la nekonatoj, kiuj subite aperis en la popolamasoj kaj ne timis akcepti koncerne siajn fratojn kaj la estonton, la respondecon de agoj, kiujn la timemuloj konsideris freneze aŭdacaj.

La granda amaso malfacile decidiĝas entrepreni ion senprecedencan. Pri tio oni povas ĉiutage konvinkiĝi. Ke la ŝimo de l'rutino ĉiupaŝe volvas nin, kaŭzas la manko de iniciatemuloj por rompi la tradiciojn de l'pasinto kaj kuraĝe sin ĵeti en la nekonataĵon. Sed se en la cerboj ĝermas ideo, ankoraŭ malpreciza, nekapabla efektiviĝi, kaj se iniciatemuloj aperas kaj eklaboras, ili estas tuj sekvataj - kondiĉe ke ilia verko respondu la malprecizajn aspirojn. Kaj dum ili laceĝaj retiriĝos, la komencitan laboron daŭrigos miloj da daŭrigantoj, kies ekziston oni eĉ ne povis supozi. Tio estas la historio de la tuta vivo de l'homaro - historio, kiun ĉiu povas konstati propraokule, proprasperte. Kiuj volis iri kontraŭflue de la aspiroj kaj bezonoj de l'homaro, nur tiuj estis malbenitaj kaj forlasitaj de siaj samtempuloj.

Bedaŭrinde, la iniciatemuloj malmultas en la ĉiutaga vivo. Sed ili subite aperas en la revoluciaj epokoj kaj verdire estas ili, kiuj faras la daŭrajn verkojn de l'revolucioj.

Tiuj nutras nian esperon kaj nian fidon en la venonta revolucio. Ili nur havu la justan - kaj sekve largan - koncepton pri la estonto, ili havu la pensaŭdacon kaj ne obstinu revivigi mortkondamnitan pasinton; sublima idealo ilin inspiru - kaj ili estos

sekvataj. Neniam, en ajna epoko de sia ekzisto, la homaro tiel sentis la bezonon je granda inspiro, kiel en la nuna momento, post trapaso de jarcento da burĝa kulturo.

o o
o

Sed por ke ili aperu, necesas la prepara laboro. Necesas, ke la novaj ideoj - tiuj, kiuj signos novan deirpunkton en la historio de la civilizacio - estu skizitaj antaŭ la revolucio; ke ili estu ege disvastigitaj en la amasoj, por ke ili povu ricevi la kritikon de la praktikemuloj, kaj ĝis certa grado la eksperimentan kontrolon. Necesas, ke la antaŭrevolucie ĝermantaj ideoj estu sufiĉe disvastigitaj, por ke certa nombro da spiritoj sentu sin al ili alkutimiĝintaj. Necesas, ke la vortoj "anarkio", "abolo de l' Ŝtato", "libera interkonsento inter la laboristaj grupiĝoj kaj la komunumoj", "la komunista komuno" fariĝu kutimaj - sufiĉe kutimaj por ke la inteligentaj malplimultoj provu funde esplori ilin.

Tiam, la Chalier, Jacques Roux, Dolivier de la venonta revolucio estos komprenataj de la amasoj, kiuj, post la unua surprizmomento, ekvidos en tiuj vortoj la esprimon de siaj propraj aspiroj.

- Sed la envio de la subprematoj mem ? Ĉu oni ne ofte kaj prave rimarkigis, ke la envio estas baro kontraŭ la demokratioj ? Ke, se la laboristo suferas tro pacience pro la aroganteco de la paltvestita mastro, li envie rigardas ĝis la personan influon de la laborkunulo ? - Ni ne neu tiun fakton; ni eĉ ne retiru nin malantaŭ la argumenton - cetere tre ĝustan - ke envio ĉiam naskiĝas el la scio, ke, akirinte influon, la kamarado uzos ĝin por perfidi siajn hieraŭajn kamaradojn, kaj ke la nura rimedo por paralizi la envion, samkiel la perfidon, estus senigi la kamaradon, samkiel la burĝon, je la ebleco pligrandigi sian aŭtoritaton, fariĝi mastro.

Ĉio ĉi estas ĝusta; sed estas io plia. Ni ĉiuj, kun nia aŭtoritateca eduko, kiam ni vidas subite aperi influon, ni pensas ĝin cedigi, nur neniigante ĝin; kaj ni forgesas, ke estas alia, multe pli efika rimedo por paralizi la jam malutilajn influojn, aŭ

tiujn, kiuj tendencas fariĝi tiaj. Tio estas fari apude ion pli bonan.

En sklava socio tiu rimedo estas neebla, kaj ni, idoj de sklava socio, eĉ ne pensas pri ĝi. Jen reĝo fariĝinta neeltenebla - kiun rimedon ni havas por liberiĝi de li, se ne mortigante lin ? Jen ministro ĝenas nin, kion fari krom serĉi kandidaton por lin anstataŭigi ? Kaj kiam "popolelektito" naŭzas nin, ni serĉas alian por konkurenci lin. Tio okazas tiel. Sed ĉu tio estas prudenta ?

Kion fakte povis fari la Konvencianoj fronte al reĝo, kiu pridisputis al ili la regpovon, krom lin gilotini ? Kaj kion povis fari la reprezentantoj de l'Montaro fronte al la aliaj reprezentantoj, disponantaj la samajn povojn - la Ĝirondanoj - krom sendi ilin siavice al la ekzekutisto ? Nu, tiu pasinteca situacio ĝis nun restas en ni, dum la nura, vere efika rimedo por paralizi malutilan iniciaton, estas mem iniciati la agadon en pli bona direkto.

Tial, kiam ni aŭdas la revoluciulojn ĝojegi pro la penso ponardi aŭ pafmortigi la regantojn, kiuj povus sin trudi dum la revolucio, ni ekteruriĝas, pensante ke la fortoj de la veraj revoluciuloj povus elĉerpiĝi en luktoj efektive celantaj nur subteni aŭ kontraŭi la individuojn, kiuj havigus al si galonon. Militi kontraŭ ili, estus jam agnoski la neceson havi aliajn galonitajn homojn.

En 1871, en Parizo, oni jam antaŭsentas pli bonan agmanieron. La popolaj revoluciuloj ŝajne komprenis, ke la "komunuman Konsilantaron" oni konsideru kiel nuran ornamon, kiel tributon pagotan al la pasintaj tradicioj; ke la popolo ne nur ne sin malarmu, sed ke ĝi plutenu, apud la Konsilantaro, sian propran organizon, siajn federitajn grupojn, kaj ke el tiuj grupoj, ne el la Urbodomo, fontu la decidoj necesaj por la triumfo de la revolucio. Bedaŭrinde, ia modesteco de la popolaj revoluciuloj, subtenata ankaŭ per aŭtoritataj antaŭjuĝoj - tiuepoke ankoraŭ tre radikiĝintaj - malhelpis al tiuj federitaj grupoj tute ignori la Konsilantaron kaj agi, kvazaŭ ĝi tute ne ekzistus, por malfermi novan eraon de socia konstruado.

o o o

Ni ne evitos la revenon de tiuj provoj de revolucia registaro en la venonta revolucio. Sed ni almenaŭ sciu, ke la plej efika rimedo por neniigi ĝian aŭtoritaton ne estos komploti ŝtatrenversojn, kiuj nur revenigus la povon sub alia formo kondukanta al diktaturo. La nura efika rimedo estos konstrui en la popolo mem forton, kiu estos potenca dank'al sia agado kaj dank'al la konstruaj revoluciaj faktoj, kiujn ĝi estos plenuminta, ignorante la povon, kiu ajn estas ĝia nomo, kaj ĉiam kreskante per sia revolucia iniciativo, sia revolucia impulso kaj sia detrua kaj reorganiza verko. Dum la Granda Revolucio de 1789-1794, estas la sekcioj el Parizo kaj el aliaj urbegoj kaj la revoluciaj urbestraroj en la urbetoj, kiuj ekskizis provojn de la Socio, preterpasante la Konvencion kaj la provincajn organojn de la revolucia registaro. Tion pruvas al ni, hodiaŭ, la jam publikigitaj dokumentoj koncerne la aktivecon de tiuj tro miskonataj organoj de la revolucio.

Popolo, kiu kapablos mem organizi la konsumadon de l'riĉaĵoj kaj ilian produktadon profite al la tuta socio, ne plu povos esti regata. Popolo, kiu estos mem la armita forto de l'lando, kaj kiu kapablos havigi al la armitaj civitanoj la necesajn koheron kaj agad-unuecon, ne plu estos komandata. Popolo, kiu estos mem organizinta siajn fervojojn, sian ŝiparon, siajn lernejojn, ne plu povos esti administrata. Kaj fine, popolo, kiu kapablos organizi siajn arbitraciantojn por juĝi siajn disputetojn, kaj en kiu ĉiu individuo konsideros kiel sian devon malhelpi, ke la kanajlo ne trompu la malfortulon, sen atendi la providencan intervenon de l'ĝendarmo, tiu popolo bezonos nek policistaĉojn, nek juĝistojn, nek provosojn.

En la pasintaj revolucioj, la popoloj prenis sur sin la detruan laboron; sed la reorganizan ĝi lasis al la burĝaro - "Pli kapablaj ol ni en la regarto, venu, sinjoroj; organizu nin, ordonu al ni la laboron, por ke ni ne malsatmortu; malhelpu al ni intervori, punu kaj pardonu laŭ la leĝoj, kiujn vi estos farintaj por ni, malklerulo j !" - Kaj oni ja scias kiel ili profitis de la invito.

Nu, la tasko, kiu trudiĝas al la popolo en la venonta ribelo, estos ĝuste proprigi al si tiun funkcion kiun ĝi iam forlasis al la burĝaro. Ĝi estos krei, organizi, kiel samtempe detrui.

Por plenumi tiun taskon, la popola revolucio bezonos la tutan iniciatkapablon de ĉiuj fervoruloj, la tutan aŭdacon de ilia penso, liberigita el la pasintaj inkuboj, ilian tutan energion. Ĝi devos ankaŭ atenti ne paralizi la iniciatemon de la plej fervoraj : ĝi devos nur intensigi sian iniciatemon, se ekmankos tiu de aliuloj, se ĝi laciĝos, aŭ se ĝi misorientiĝos. La pensaŭdaco, pli neta kaj larĝa koncepto pri ĉio, kion oni aspiras, la konstrua forto subite aperanta el la popolo mem laŭgrade kiel ekaperas la neado al la aŭtoritato; kaj fine ĉies iniciatemo en la rekonstrua verko - jen kio havigos al la revolucio la potencon, kiun ĝi devas posedi por venki.

Ĝuste tiujn fortojn celas disvolvi la aktiva propagando de la anarkistoj same kiel la filozofio mem de Anarkio. Al la disciplino - tiu savankro de la aŭtoritatuloj - ili kontraŭmetas la plenan iniciatemon de ĉiuj kaj de ĉiu. Al la troŝparemaj konceptoj pri reformetoj, kiujn proponas la burĝiĝintaj partioj, ili kontraŭmetas la larĝan kaj grandan koncepton de la revolucio, kiu, sola, povas doni la necesan inspiron. Kaj al tiuj, kiuj ŝatus vidi la popolo sin limigi al rolo de hundaro ĵetita kontraŭ la momentan regantaron, sed ĉiam retenata per la vipo, ni diras : "La partopreno de l'popolo en la revolucio devas esti pozitiva kaj samtempe detrua. Ĉar nur ĝi povas sukcesi reorganizi la socion surbaze de egaleco kaj libereco por ĉiuj. Transdoni tiun taskon al aliuloj estus perfidi la celkaŭzon mem de la revolucio."

-==o==-

Kropotkin (19.jan.1883):

## Deklaro de la anarkistoj akuzitaj antaŭ la pun-tribunalo de Liono

Kio estas la anarkio, kio estas la anarkistoj, tion mi tuj diros :

La anarkistoj, sinjoroj, estas civitanoj, kiuj, en jarcento kiam oni ĉie predikas la opiniliberon, kredis sia devo elvoki la senliman liberon.

Jes, sinjoroj, ni estas tra la mondo kelkaj miloj, kelkaj milionoj da laboristoj, kiuj postulas la absolutan liberon, nur la liberon, la tutan liberon !

Ni volas la liberon, t.s. ni postulas por ĉiu homo la rajton kaj la rimedon fari ĉion, kio plaĉas al li, kaj fari nur tion, kio plaĉas al li; plene kontentigi ĉiujn siajn bezonojn, sen alia limo ol la naturaj maleblоj kaj la bezonoj de siaj egale respektindaj najbaroj.

Ni volas la liberon kaj ni kredas ĝian ekziston neakordigebla kun la ekzisto de ajna regpovo, kiaj ajn estas ties origino kaj ties formo, ĉu ĝi estas elektita aŭ trudita, ĉu monarkia ĉu respublika, ĉu ĝi inspiriĝas el la dia juro ĉu el la popola juro, ĉu el la sankta Ampolo, ĉu el la universala voĉdonrajto.

Tial, ĉar la historio ja instruas al ni, ke ĉiuj registaroj similas unu la alian kaj egalvaloras. La plej bonaj estas la plej aĉaj. Pli da ciniko ĉe iuj, pli da hipokrito ĉe la aliaj ! Esence, ĉiam la samaj procedoj, ĉiam la sama netoleremo. Eĉ la ŝajne plej liberalaj kaŝas en la polvo de la leĝara arsenalo iun taŭgan leĝeton pri la Internacio, kontraŭ la ĝenaj opozicioj.

Alivorte, laŭ la anarkistoj, la malbono ne kuŝas en tiu formo de registaro pli ol en tiu alia. Ĝi kuŝas en la registara ideo mem, ĝi kuŝas en la aŭtoritata principo.

Unuvorte, la anstataŭigo en la homaj interrilatoj de la administra kaj leĝa regado, de la trudita disciplino, per la libera kontrakto, konstante reviziebla kaj nuligebla, jen estas nia idealo.

La anarkistoj celas do montri al la popolo kiel forhavi registaron, samkiel ĝi eklernas forhavi Dion.

Ĝi same lernos forhavi proprietulojn. Fakte, la plej aĉa tirano ne estas tiu, kiu enkarcerigas vin, sed tiu, kiu malsatigas vin : ne tiu, kiu kaptas vin ĉe la kolo, sed tiu, kiu kaptas vin ĉe la ventro.

Neniun liberon sen egaleco ! Neniun liberon en socio, kie la kapitalo estas monopoligita en la manoj de malplimulto, kiu ĉiutage malplimultiĝas kaj kie nenio estas egale dispartigita, eĉ ne la publika instruado, kiu tamen estas pagata per ĉies mono.

Ni mem kredas, ke la kapitalo, komuna heredaĵo de l'homaro - ĉar ĝi estas la frukto de la kunlaborado de la pasintaj generacioj kaj de la nuntempaj - devas esti je ĉies dispono, tiel ke neniu povus ne profiti de ĝi; kaj, male, ke neniu povu akapari parton da ĝi malprofite al la ceteruloj.

Unuvorte, ni volas la egalecon : la faktan egalecon, kiel korolarion aŭ prefere kiel nepran kondiĉon de la libero. "De ĉiu laŭ ties kapablo, al ĉiu laŭ ties bezonoj", jen kion ni volas sincere, energie; jen kio estos, ĉar ekzistas neniu leĝo, kiu povus superi postulojn samtempe pravigitajn kaj necesajn. Jen kial oni volas kondamni nin al ĉiuj senhonorigoj.

Krimuloj ni ja estas ! Ni postulas la panon por ĉiuj, la laboron por ĉiuj; por ĉiuj ankaŭ la sendependecon kaj la justecon.

---

La anarkio : ĝia filozofio, ĝia idealo.

(ekstrakto)

Ke socio, reakirinte ĉiujn riĉaĵojn akumulitajn en ties sino, povas facile certigi abundon por ĉiuj, kontraŭ ĉiutage 4 aŭ 5 horoj da efektiva kaj mana laboro en la produktado, pri tio jam unuanime konsentas kun ni tiuj, kiuj pripensis tiun demandon. Se ĉiu, ekde sia infanaĝo, lernus ekscii de kie venas la pano, kiun li manĝas, la domon, kiun li loĝas, la libron, kiun li studas, ktp, kaj se ĉiu kutimiĝus kom-

pletigi la spiritan laboron per la braka laboro, en ĉiu fako de la mana produktado, la socio povus facile sin liberigi el tiu tasko, eĉ sen kalkuli sur la simpligoj de la produktado, kiujn havigos al ni pli malpli proksima estonto.

Fakte sufiĉas momente pensi pri la nekredebla, neimagebla malŝparego de homaj fortoj, kiu hodiaŭ okazas, por ekkonscii kion civilizita socio povas produkti, per kiel eta ĉies laboro la grandiozajn verkojn, kiujn ĝi povus entrepreni kaj pri kiuj hodiaŭ oni ne povas pensi. Bedaŭrinde, la metafiziko, kiun oni nomas politik-ekonomio, neniam zorgis pri tio, kio devus konsistigi ĝian esencon, la forto-ŝparadon.

Pri la ebleco de riĉeco en komunisma socio, ekipita kiel ni estas, ne plu estas duboj. Sed duboj ekaperas, kiam leviĝas la demando, ĉu tia socio povos ekzisti, dum la homo estos submetita en ĉiuj siaj agoj al la Ŝtata kontrolado; ĉu necesas por atingi la bonfarton, ke la eŭropaj socioj oferu la malmulton da persona libero, kiun ili rekonkeris dum tiu jarcento, je la kosto de tiom da foroferoj.

Parto el la socialistoj asertas, ke neeblas atingi tian rezultaton sen foroferi sian liberon sur la altaro de l'Ŝtato. La alia, al kiu ni apartenas, male opinias, ke nur per la abolo de la Ŝtato, per la konkero de la tuta libero de la individuo, per la libera interkonsento, la absolute liberaj asociiĝo kaj federiĝo, ni povas atingi la komunismon, la komunan posedon de nia heredaĵo kaj la komunan produktadon de ĉiuj riĉaĵoj.

Tie estas la problemo, kiu nun superas ĉiujn aliajn kaj kiun la socialismo devas solvi, se ĝi ne volas vidi endanĝerigitaj ĉiujn siajn klopodojn kaj paralizita sian tutan postan disvolviĝon.

Se ĉiu socialisto bonvolos retrorigardi al la estinteco, li verŝajne memoros la amason da antaŭjuĝoj, kiuj vekiĝis en li, kiam li unuafoje ekpensis, ke fariĝas historia necesaĵo la abolo de l'kapitalisma sistemo kaj la eksproprigo de l'grundo kaj de l'kapitaloj.

La samo okazas ĉe tiu, kiu unuafoje aŭdas, ke la abolo de l'Ŝtato, de ĝiaj leĝoj, de ĝia tuta sistemo de regado, de registarismo kaj de centralizado, ankaŭ

fariĝas historia necesaĵo; ke la abolo de unu materie neeblas sen la abolo de la alia. Nia tuta edukado - kiun ja faris, bone atentu tion, la Eklezio kaj la Ŝtato, por la profito de ambaŭ - ribelas kontraŭ tiu koncepto.

Kaj tamen ĉu ĝi tial estas malpli ĝusta ? Kaj en la brulofero de antaŭjuĝoj, kiun ni jam faris por nia emancipiĝo, ĉu devas transvivi tiu pri la Ŝtato?

Restante salajrulo, la laboristo restus sklavo de tiu, al kiu li estus devigata vendi sian forton, ĉu tiu aĉetanto estos privatulo, ĉu la Ŝtato.

En la popola spirito, en tiu amaso da miloj da opinioj, kiuj trapasas la homajn cerbojn, oni ankaŭ sentas, ke se la Ŝtato devus anstataŭi la mastron en ties rolo de aĉetanto kaj kontrolanto de la laborforto, tio ankoraŭ estus abomeninda tiraneco. La popolano ne rezonas laŭ abstraktaĵoj, li pensas per konkretaj terminoj, kaj tial li sentas, ke la abstraktaĵo "Ŝtato" enkorpiĝus en multaj oficistoj, elektitaj elinter liaj laborkunuloj, kaj li ja bone scias, kion pensi pri iliaj virtoj; hodiaŭ, bonegaj kamaradoj, ili fariĝus morgaŭ neelteneblaj administrantoj. Kaj li serĉas la socian konsiston, kiu eliminas la nunajn malbonojn, sen krei novajn.

Tial la kolektivismo neniampasiigis la amasojn, kiuj ĉiam revenas al la komunismo, sed al komunismo pli kaj pli senigita de la teokratio kaj de la jakobena aŭtoritatismo de la jaroj '40, al la libera komunismo, anarkisma.

Mi eĉ aldonos ke, konstante pensante pri tio, kion ni vidis dum kvaronjarcento en la eŭropa socia movado, mi ne povas malpermesi al mi kredi, ke la moderna socialismo estas nepre devigata fari antaŭenpaŝon al la liberecana komunismo.

--==o==--

Esperantigis : Kribo.

Gérant & imprimeur : Baudé, 47340 Laroque